# *IL – KANTO - gr**ama**tika*



Ilo, ilo, fosilo:
per ĝi fosis mi longe,
faris sulkojn laŭlarĝe,
kaj laŭlonge – oblonge.

Ilo, ilo, tranĉilo:
per ĝi tranĉos mi panon.
senŝeligos mi cepon,
por fortigi la sanon.

Ilo, ilo, tondilo,
eta, brila tondilo:
per tondilo ŝi tondas
la ungetojn ŝi formas.

Ilo, ilo, kombilo,
ŝia ora kombilo…
per ĝi kombas tri horojn
ŝi la brilajn… silkharojn.

Ilo, ilo barilo…
fia ŝia barilo….
per barilo sin baras...
ŝi kompaton avaras.

Lata, lata barilo,
ŝi sin baras barile
per terura lataro,
ŝi sin baras… terore.

Mura, mura barilo,
pro belego femura
ŝi sin baras barile
per barilo terura

Heĝo, verda barilo,
jen vi estas pli bona!
ŝi sin baras per heĝo –
transe tentas jam seĝo.

Heĝo, verda barilo,
persvadebla ŝirmilo:
sin ofertas honore.
trans la heĝo ja seĝo.

Ilo, ilo barilo
kial vi ŝin plu baras?
Kiel mi vin transiru
sen ke vestojn mi ŝirus?

Ilo, ilo barilo!
Kial vi ŝin plu baras!
Kiel mi vin transiru
sen ke vestojn vi ŝirus?

Ili, ilo segilo
min dissegi ne volu
trans baril' ŝi min tiras
tiel ke mi mem miras.

.





